# DISKUTEJO:

## Kial oni ne plu parolas pri la socia revolucio?

Kiam la laborista movado ekkreskis, sed ankoraŭ estis sufiĉe malforta — antaŭ kelkdek jaroj —, oni ofte parolis pri la socia revolucio. La burĝaro eĉ treege timis ĝin k ĉiarimede subpremis la porsocialisman propagandon, por malebligi revoluciajn agojn. Tiutempe en la parlamentoj sidis aŭ neniu aŭ areto da laboristpartiaj reprezentantoj. Kiam unu el tiuj malmultaj lab. deputitoj paroladis, la tuta burĝa klaso ekaŭskultis k ĝia gazetaro dediĉis longajn artikolojn al la vortoj de l'„renversulo", kiu minacis la baldaŭan mondrevolucion.

Depost tiam ja ĉio ŝanĝiĝis. Hodiaŭ en la parlamentoj sidas ne unu, sed dekoj aŭ eĉ centoj da lab. reprezentantoj, kiuj kelklande eĉ partoprenas en la registaro. Sed iliajn paroladojn la burĝaro preskaŭ ne atentas k ĝi ankaŭ ne plu timas pro ili. Plej ofte oni decidas rekte kontraŭ la deziroj de la lab. deputitoj. Sed nenio okazas, ĉiuj silentas k neniu — krom la faŝistoj — mencias la vorton „revolucio".

Mi ŝatus ekscii klarigojn pri tiu stranga stato, sed oni evitu la konatajn k demagogiajn argumentojn.

*16 462.*

## Pri la framasonio.

Mi tuj diru, ke per sia ritaro k per sia doktrino la framasonio iom varias laŭ la landoj k eĉ laŭ la diversaj loĝioj; sed ĝia idealo estas ĉie la sama: ĝi celas al la justo en la Socio k al la frateco inter ĉiuj homoj. La framasonoj prave fieras pri tiu sia celo k pri sia laboro, k tial mi miras, vere, ke iu inteligenta viro povas ilin juĝi tiel maljuste, kiel K-do 8004. Lia artikolo, en la n-o 387, de la komenco ĝis la fino estas nur ia kolekto da krudaj kalumnioj, ia teksaĵo el stultaj malveroj. En ĝi troviĝas la kutimaj atakoj de la katolika pastraro; mankas nur la diablo, prezidante mem iliajn inferajn kunvenojn. Kompreneble mi ne donos al mi la penon rebati tielajn senbazajn asertojn; la mensogon, absurdan, groteskan, oni ne refutas: ĝin oni preterlasas, ridante. Ho! tiuj germanaj fratoj niaj, kiuj pagas kotizon de 150 plus 50×12=750 markoj, t. e. 4500 frankoj; tondro! tiuj vere ne suferas pro la krizo. Sciu ankaŭ, vi profanuloj, ke ĉiu membro en ĉiu loĝio devas solene ĵuri, ke li prisilentos la framasonan sekreton *sub puno per morto*. Kaj kiu iam scios, *kiom da fiagoj* oni devas meti sur la konton de tiuj sindirantaj filantropoj? Kiu povus koni ĉiujn *murdojn* krimitajn de tiu institucio, kiu *stultigas k subpremas la popolon?* — Brrr! Tio estas vere terura, tremiga, abomena! Tial mi haltas, konsilante nur al nia K-do, ke li iom studu la historion de la framasonio en seriozaj verkoj, aŭ, se li ne havas sufiĉe da tempo por tion fari, ke li simple legu en nia *Plena Vortaro* la difinon pri la *framasono:* ĝi estas iom konciza, sed tre ekzakta. *H. B.*

Kiel mi havigos al mi
belajn ilustritajn plurkolorajn
POŜTKARTOJN
kiuj simboligas la idealon
DE SAT
?
**Serion** de 5 tiaj artaj kartoj liveras kontraŭ pago de 0,50 mk. g.
**Administracio de SAT Leipzig O. 27, Kolmstr.**

# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

## Proklamo.

La Gvida Komitato de la Internacia Liberpensula Unuiĝo kun kontento eksciis, ke la hispana registaro dekretis la nuligon de la Jezuita Ordeno en sia lando.

Kvankam ankaŭ en aliaj ŝtatoj ekzistas kontraŭ la jezuitoj leĝoj, kiujn Romo devas toleri, tamen la Papo provas ŝajnigi, ke la jezuitoj en Hispanujo estas martiroj, same kiel li provis pravigi la kontraŭrevolucian agadon de la katolika eklezio en Meksikio, fiprezentante la procedon de la meksika registaro kiel persekuton al religio.

Fakte nur la celado por la propra vivo devigis la junan hispanan respublikon sekurigi sin per ekstermo de ĉiuj sekretaj kaŝejoj de kontraŭrespublika agitado. Al tiuj kaŝejoj apartenas unuavice la Jezuita Ordeno k la sponta kontraŭeklezia movado en la hispana popolo sin turnis laŭ bona respublika instinkto precipe kontraŭ la jezuitoj.

Miloblaj ekzemploj ekzistas en la historio pri la pereiga socia agado de l' jezuitoj. Ni citu ci tie nur la batalon de la jezuitoj kontraŭ moderna lernejo, en Hispanujo siatempe fondita de Francisko Ferer (Ferrer). Oni lin mortigis pro tiu kuraĝa progresema entrepreno. Ne trankviliĝis la jezuitoj, ĝis ili per intrigoj ĉiuspecaj — pri kiuj ili tre spertas — atingis lian kondamnon k paf-mortigon.

Tiu sola faro de l'jezuitoj pravigas, ke ilia danĝera influo en Hispanujo radikale estu forigata. Sed ĉi tie ne temas pri puno pro krimoj iamaj, sed pri sekuro al socia progreso en la nuntempo.

Tial la Gvida Komitato de I. L. U. gratulas la repezentantojn de la hispana popolo pro tiu procedo kontraŭ la Jezuita Ordeno. Multo ankoraŭ estas farenda. La katolika eklezio, plej fidela apogo por monarkismo, en Hispanujo, postlasis malbonan heredaĵon. Sufiĉas ja citi la analfabetojn, kiuj svarmas plej abunde ĝuste en tiuj regionoj, kie la eklezia influo radikas en la popolo mem. Necesas tie multjara pacienca laboro, por fine forigi tiun mankon pri kulturo.

Tamen — farita estas la unua sukcesplena paŝo laŭ tiu direkto. Nun estas ebla al la hispanaj liberpensuloj, daŭrigi la de Francisko Ferer komencitan laboron. Ni liberpensuloj scias, ke religio havas radikojn sociajn k nia laboro celas racionalismon, estratan de veremo.

Instigate de tiu veremo, kiu ja estas nur unu el la formoj de justo, ni protestas kontraŭ ĉiuj trompaj artifikoj de l' klerikaro k per ĉiuj fortoj ni klopodos, subteni niajn samideanojn en Hispanujo sur ilia vojo al libero!

*Por la Gvida Komitato de I. L. U.*
*(Internacia Liberpensula Unuiĝo).*

La sekretario: *Th. Hartvig.* La prezidanto: *Dr. M. Tervanj (Terwagne).* La membroj de la Gvida Komitato: *M. Zivers (Sievers)*, Berlin, *Dr-o. B. Milde*, Prago, *Fr. Ronzal*, Vieno.

El „La Ateisto" N-o 4, 1. IV. 32.

## Prireligia statistiko.

La Ekleziastiko *(Ecclesiastica)* publiĝikis en sia n-o 6 de l' 6. II. 32, la sekvantan interesan statistikon pri la religioj sur tero:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Romkatolikoj: | 351 839 665 | t. e. | 19,0 % |
| Konfucianoj: | 304 027 114 | t. e. | 16,4 % |
| Hinduanoj: | 233 997 819 | t. e. | 12,6 % |
| Mahometanoj: | 229 008 599 | t. e. | 12,5 % |
| Budhanoj: | 199 461 632 | t. e. | 10,8 % |
| Protestantoj: | 164 683 026 | t. e. | 8,9 % |
| Ortodoksaj: | 131 460 822 | t. e. | 7,1 % |
| Idolanoj: | 122 239 817 | t. e. | 6,6 % |
| Neeklezianoj: | 76 598 195 | t. e. | 4,1 % |
| Ŝintoistoj: | 16 644 437 | t. e. | 0,9 % |
| Judoj: | 15 731 475 | t. e. | 0,9 % |
| Nekonatoj: | 4 481 733 | t. e. | 0,2 % |
| Sume: | 1 850 174 334 | t. e. | 100,0 % |